

v 23562 / 10 (1946r.) N. 43-517-12
ESPERANTO



**OFICIALA ORGANO
DE INTERNACIA
ESPERANTO-LIGO**

INTERNACIA

Eldonejo kaj Redakcio : Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

VOL. 10, N-RO 1

JANUARO, 1946

I. A. P. K.

La Internacia Asocio de Poŝtmarko-Kolektantoj.

Vi povos utiligi ĉi tiun Asocion, kiel la plej efikan propagandilon iam prezentitan al vi, se vi nur estimas la rolon, kiun ĝi povas ludi en la klopodado enradikigi nian lingvon en la praktikan vivon de la homoj.

Vi povas nur konvinkiĝi per aplikado de niaj principoj. La filatelisto jam inklinas pensi internacie kaj la enkonduko de Esperanto en filatelajn aferojn montros la utilecon de nia lingvo. Tia konvinko vole nevole sin trudos, kiam la filatelisto vidos la rezultojn de niaj laboroj.

Krom tio, la Esperanta movado gajnos kaj forte kaj finance per rilato kun nia afero. La Asocio provizas perlaboran gajnon al siaj agentoj, kiuj plejparte estas Esperantistoj.

Ni ankoraŭ bezonas agenton en kelkaj landoj : se vi estas respondeca persono, akceptu oficon kaj unuigu la du aferojn. Ligu Esperanton kun la filatelo—aŭ inverse, laŭ via volo !

Ni bezonas :—a. Membrojn. d. Verketojn.
b. Agentojn. e. Poŝtmarkojn.
c. Kotizojn. f. Reklamojn.

Se vi ankoraŭ ne ricevis ekzempleron de nia Bulteno Internacia, petu ĝin kaj poste abonu ĝin por plifortigi nian agadon !

Org. Sek. : P. H. Lewis, XPDO-Domo, Didcot, Berks, Anglujo.

ANONCETOJ

Kosto : du pencej por ĉiu vorto, aŭ internacia respondekupono por ĉiuj du vortoj.

25-jara Franco deziras korespondi kun tutmondaĵ Esperantistoj kaj Esperantistinoj. Jacques Doyelle, rue de Dunkerque 27, Bourbourg, Nord, Francujo.

La Kvakerismo (Religia Societo de Amikoj)—Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (Esperanta kaj angla) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, London, N.W.1, Anglujo.

Korespondrondo tuthoma—Por studi, kundiskuti kooperajn komunumojn. Por interŝanĝi tutplanedajn informojn, novaĵojn, ideojn pri ili kaj pri aliaj kooperaj aferoj. Adresu: Korespondrondo Koopera, per *Esperanto Internacia*.

Korespondas kaj interŝanĝas Esperantajn librojn kaj gazetojn, I. Iš-Kerioth, P.O.B. 7015, Jerusalemo, Palestino.

Mi kolektas ilustritajn poŝtkartojn, sed oni sendu ilin sen koverto. D-ro Francisco Demacq Rosas, Rua Senador Feijo 29, Sao Paulo, Brazilo.

Al miaj geamikoj mi sciigas ke mi travivis la teruran tempon de nia sklaveco kaj ke mi senpacience atendas iun ajn vivsignon de ili. Skribu, sendu gazetojn, vivu feliĉe en nova mondo! Faka instruistino Julie Supichová, Malá Stépanská 6-II, Praha II-2032, Ĉeĥoslovakujo.

Meblista ilaro. Kiu meblisto volas vendi aŭ donaci meblistan ilaron al nederlanda samideano, kiu perdis ĉion pro la milito? Adreso: S-ro H. Arends, Gravenstraat 16, Arnhem, Nederlando.

Esperanta korespondanto dezirata en Danujo kaj Francujo (suda). Skribu al E. Youngash, 44 Parkgate Road, Watford, Herts., Anglujo.

La anoj de U.V.E. deziras korespondi. Sendu leterojn kaj kartojn antaŭ Marto 1946 al E. S-ro G. H. Kondijs, P. Potterstraat 16, Utrecht, Nederlando.

Letervesperon aranĝos la 12an de Februaro 1946 Esperanto-grupo "Por la paco". Sendu multnombrajn ilustritajn poŝtkartojn belege afrankitajn. Respondo garantiata. André Mériaux, 84 rue de l'Égalité, Hénin-Liétard, Pas de Calais, Francujo.

Klubanoj de Esperanto-Klubo en Moravská Ostrava-Vitkovice, Trebízského 29, Ĉeĥoslovakujo, deziras korespondi kun gesamideanoj el la tuta mondo.

Lernantina Grupo en Krakovo deziras korespondi pri ĉiuj temoj. Mi garantias respondon. Mario Gajdarska, Pošta I, Krakow, Polujo.

Novzelandaj pactempaj poŝtmarkoj vendiĝos lan de Marto 1946. Tuta serio kostos 4s. 4p. Sendu poŝtmandaton aŭ respondekuponojn por ricevi poŝtmarkojn deziratajn. Diru ĉu uzitaj aŭ neuzitaj poŝtmarkoj dezirataj. S-ro Clarence Chitty, Kaukapaka, Nov-Zelando.

Por korespondi kun ĉiuj landoj, interŝanĝi objektojn, aliĝu al la trilingva klubo "Amikeco". Petu informojn al; O.T.P., 4 rue J. C. Tissot, St. Etienne, Francujo.

Juna sveda ĝardenisto deziras korespondi kun eksterlandaj ĝardenistoj, botanikistoj, kaj naturamikoj. S-ro Richard Moholm, Seminaria ĝardeno, Falun, Svedujo.

Poŝtmarkojn interŝanĝas Anibal Ferreira, The National City Bank of New York, Caixa Postal 770, Rio de Janeiro, Brazilo.

Filatelisto serĉas rilatojn. Paul Gianini, Zollikerberg, Svislando.

Svisa Internacia Servo, Hallerstrasse 16, Bern, Svislando, deziras ricevi anekdotojn, legendojn, fabelojn, humoraĵojn, novelojn kaj romanojn el la tuta mondo, kontraŭ honorario; deziras interŝanĝi kun ĵurnalistoj kaj verkistoj ĉie.

Mi deziras korespondi kun gevegeteranoj en Francujo. Skribu en Esperanto, angla aŭ franca al F-ino O. Robotham, 14 Wensley Road, Stockton-on-Tees, Anglujo.

Aninoj de la Ratcliffe Culey Esperanta Grupo, 9-14 jaraj, deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj. Bonvole skribu al S-ro Delgado (Prezidanto), Church Cottage, Ratcliffe Culey, Atherstone, Warwickshire, Anglujo.

Esperantistoj ĉiulandaj! Sendu leterojn aŭ poŝtkartojn por grupa letervespero okazonta en Aprilo. Skribu al la Sek., F-ino N. Hanson, 102 Vegal Crescent, Ovensden, Halifax, Anglujo.

ESPERANTO



OFICIALA ORGANO
DE INTERNACIA
ESPERANTO-LIGO

INTERNACIA

Eldonejo kaj Redakcio: Internacia Esperanto-Ligo, Herongate, Rickmansworth, Anglujo

VOL. 10, N-RO 1

JANUARO, 1946

NOVAJ TEMPOJ . . .

Kiam en aŭgusto pasintjare ĉesis tondri la armiloj, kaj ni sciis, ke ankoraŭfoje venis la paco—eĉ se ĝi ne estis la formala finsigelita paco, tamen la efektiva fino de batalado kaj hombuĉado—ni denove spiris kaj ekfokuis nian atenton laŭ nova perspektivo sur la tujajn problemojn. Ni devis lerni nin alĝustigi al la nova vivmaniero kaj al novaj problemoj, kreitaj de la paco.

Tio supozeble estis pli malpli ĝenerala konstato ĉe ĉiuj homoj, kaj la kelkmonata intertempo—de aŭgusto ĝis la jarfino—ebligis ĝisgrade tiun realiĝustigon.

Nun en la nova jaro, ni konscias ankaŭ pri io alia, io pli grava, pli vasta. Ni staras ne nur en la komenco de nova jaro, sed ankaŭ de nova epoko ! Tiel same kaj tiel certe, kiel okazis pri la homaj aferoj en 1914–18, unu paĝo estas turnita en la historilibro de la homaro kaj ĝia mondo, kaj nun frontas al ni nova, blanka folio enskribota. Ni faru el ĝi, kion ni volos !

En tiu nova mondo ekburĝonanta, kiu efektive estos speco de transiro, periodo de senĉesaj alĝustigo kaj adaptigo, la momento estas oportuna, ja matura, por grandskala propagando de Esperanto.

La homoj ne nur laciĝas je milito, sed sopiregas al daŭra paco. Ili estas pretaj, avidaj je rimedoj por finsolvi la ĝis nun plej grandan problemon de la mondo. Neniam antaŭe okazis tiel grandegaj el-, en- kaj transmigradoj de la homoj. Neniam antaŭe tiom da homoj povis konstati per propra sperto la grandegan barilon de babelo. Sekve de tiuj spertoj ili jam nun komprenas, ke en la novmonda idearo ne estos loko por la mallarĝaj kaj paroĥecaj limigoj de la antaŭmilita tempo, kaj ili sopiras al pli vasta, pli intima rilatado kun la frathomoj, kiujn ili jam ĝisgrade ekkonis.

Jen do antaŭ ni etendiĝas tero jam plugita kaj ĝis grado semita ; ni profitu la cirkonstancon kaj per ĉiuj niaj fortoj, per ĉiuj niaj rimedoj kulturu tiun fekundan grundon !

La senprecedenca alfluego de novaj aliĝoj, abonoj, kontribuajoj al la gazeto kaj korespondaĵoj, kiuj lavange minacas sufoki la stabanojn de la Centra Oficejo, konfirmas nian kredon, ke la Esperanto-movado sin trovas sur la sojlo de granda antaŭeniĝo al eĉ pli grandaj sukcesoj ol ni iam konis en la pasinteco.

Rilate nian gazeton, ni jam formulis nian programon kaj senhezite antaŭavizas, ke *Esperanto Internacia* fariĝos ne nur oficiala organo de IEL, sed ankaŭ la unuaranga literatura kaj informa periodaĵo Esperantlingva.

En la nuna kaj lastatempaj numeroj de nia gazeto aperas artikoloj aparte emfazantaj la praktikan aplikadon de Esperanto en aferoj objektivaj, neidealaj. Tio povas doni impreson, cetere eraran, al iuj niaj fervoraj amikoj, ke ni jam ne kontribuas al la altaj idealoj, kiuj estis dum multaj jaroj gvidaj principoj de nia movado. Se tiu impresio efektive estas donita, ni deziras certigi, ke ĝi estas erara.

Novaj tempoj, novaj vojoj estas malnova devizo, kiu iufoje estas uzata por pravigi neindan agadon. Tion uzante, ni diras nur la faktojn. La tempoj, la ritmo de la vivo, la psikologio de la homoj multe ŝanĝiĝis. Tio ne volas diri, ke fundamente, sub la ekstero de ofte ŝajna indiferecenteco pri tio, kion ni alte ŝatas, ne sin trovas kerno de idealismo. Tute ne. Tamen oni devas allasi, ke la vivo, kiom koncernas la ĉiutagajn aferojn, fariĝis pli kaj pli materialisma. En la nuna tempo oni povas diri, bedaŭrinde, la homoj tendencas juĝi aferojn laŭ pure materialaj valoroj. Se ili tion faras, nu, eble la vivo kaj la medio devigis tion. Ni ne juĝu. Do, vole nevole ni devas propagandi Esperanton en tiu sama mondo.

La tiel nomitaj 'praktikaj' homoj ne necese estas homoj sen idealoj. Ili povas esti, plej ofte estas, homoj same entuziasmaj, kiel antaŭ longe, sed kiuj elserĉas novan aliron al la malnova celo. Por ili, kiel ankaŭ por ni, tondre reehadas tra la jaroj, "kun tia Esperanto ni volas havi nenion komunan!" kaj niaj praktikaj samideanoj fundamente estas, bonvolu kredi, ankoraŭ sam-ideanoj.

M.S.

KONCERTO ORIGINALA

Vi povas aŭdi en la arbaro la plej ravan koncerton. La muzikantoj ne bezonas agordi siajn ilojn. Ĉi tie estas la kardelo, kiu donas la tonon, kaj ludas unuavide la violonon. Jen la fringo kaj la silvio akompanas lin. La alaŭdo ludas fluton, la turdo, klarineton, kaj la merlo, fajfilon. La nigra korvo ludas la violonĉelon. La kukolo sonigas tamburon, la kutorno, trumpeton, kaj la pigo frapas la takton. Neniaj oni rimarkas malakordiĝon; ĉio estas harmonia. Fine, la najtingalo, tute sola, sonigas ilon, kiu estas pli milda ol piano kaj orgeno, kaj pli ekzaltiga ol la plej bela orkestro. Tiuj virtuozaĵoj ludas por la honoro de la tremajesta komponisto.

M. Sherif Hafez, Egipthujo

GRAVA ALVOKO

Je Novembro 22a, 1945 la Brita Ministro de Edukado, F-ino Ellen Wilkinson, faris anoncon, kiu havas gravan signifon por ĉiuj Esperantistoj. F-ino Wilkinson inaŭguris planon, kiu konsistas el du partoj:—

(1) Oni povas sendi la nomojn kaj adresojn de gimnaziaj lernantoj, kiuj deziras korespondadi franclingve kun francaj infanoj, al la Ministerio. Ĉi tiun informon oni resendos al la Franca Oficejo por Internacia Lerneja Korespondado, kiu respondecos pri taŭgaj francaj korespondemuloj, kiuj kompreneble respondos anglaclingve.

(2) Oni intencas kunigi lernejojn kun similaj interesoj; ekzemple oni kunigos marhavenan urbon kun marhavena urbo minhavanta regionon kun minhavanta regiono, ktp.

Estas ankaŭ arango pri la interŝanĝo de instruistoj, kaj pri organizotaj libertempoj, kiam transportrimedoj pliboniĝos.

Ĉi tiu oficiala agnosko de la Brita Ministerio pri la graveco de kaj korespondado kaj kontaktoj inter anglaj kaj francaj lernejinfanoj, kaj la utileco de dumlibertempaj renkontiĝoj estas gravega, kaj ni devus tuj profiti de tiu prezentita ŝanco. Se estas bone por anglaj kaj francaj infanoj el duagrada lernejoj interamikigi, kaj tiel plivastigi Francan-Britan interkonsenton, tiam certe egale veras, ke profitos al la homaro se ĉiuj infanoj el ĉiuj nacioj havos similajn ŝancojn.

Mi opinias, ke ĉiuj landaj asocioj Esperantistaj devus tuj efektiviĝi la plej fortan agadon por instigi siajn respektivajn registarojn partopreni en ĉi tiu oficiale inspirita interrilatiĝo inter la gejunuloj, *kaj pere de Esperanto*.

Esperantistoj, jen okazo por frapego pro nia afero. Agu! Agu tuj kaj agu grandamase!

J. Heath,

Peranto por korespondado, Brita T.J.O.

LA BETULO

En la nokta fundo
la gardanta hundo
de la farmo bojas.

Sur ĉiel' opala
la lunarko pala
malrapide vojas.

Kaj de la betulo,
en ripeta lulo,
branĉoj, kiuj pendas,

Kiel sonas bruo
de sovaĝa fluo,
longe, longe pendas.

L. Thévenin, Francujo

ESPERANTO EN ĈEHOSLOVAKUJO DUM LA GERMANA OKUPADO

Hitler volis detrui Ĉeĥoslovakujon per ĝia divido. La 15an de Marto 1939 li deklaris sendependan Slovakujon kaj la 16an de Marto li dekretis, ke la okcidenta parto de tiama Ĉeĥoslovakujo fariĝis "Protektorato, Bohemio kaj Moravio." La marioneta registaro Slovaka nenion entreprenis kontraŭ la Esperanto-movadon, sed kiam la Esperanta Klubo en Bratislava prezentis al sia ministerio por internaj aferoj peton pri permeso disvastigi sian agadsferon sur tutan Slovakujon, la ministerio dum tri jaroj ne respondis al la petskribo kaj nur en la jaro 1944, kiam malvenko de la Germanoj estis facile divenbla, ĝi plenumis la peton de la Klubo. Tiam la Klubo dissendis cirkulerojn al diversaj adresoj en Slovakujo, kun la sciigo, ke ĝi fariĝas la enlanda centro de la movado; tamen ĝi ricevis nur ĉirkaŭ 20 respondojn. Eĉ tiam la movado ne ekfloris. Neregule kunvenadis en kafejo kelkaj samideanoj en Bratislava. Tamen la Esperantismo daŭre vivis. Pri tio meritas dankon S-roj P. Rosa kaj V. Jukl.

En la Protektorato la invadintaj Germanoj brue proklamadis, ke la loĝantaro tre volonte adaptiĝas al la novaj naciistaj vidpunktoj, ke la faŝisma ideologio estas ĝoje akceptata de la ĉeĥa popolo. Ĝuste tial la Esperanto-Asocio de Ĉeĥoslovaka Respubliko decidis ne sin likvidi, sed daŭrigi sian ekziston ankaŭ sub la regado de la invadintoj. Ni ŝanĝis nian statuton por ĝin adapti al la Protektorata ŝtatjuro ŝajnigante, ke ni kredas la promeson pri kultura aŭtonomio ĉeĥa en la Protektorato kaj decidis atendi ĝis oni malpermesus. Ni aperigis du numerojn de la asocia organo "Ligilo" 25.8 kaj 27.11 1939. La redaktado estis tasko temporaba ĉar ni devis prezenti al la Germana soldata cenzuro tutan germanlingvan tradukon. Kiam estis kompostata la lasta numero de la jar-kolekto 1939, venis en nian oficejon du anoj de la Gestapo kaj deklaris al la ĉeestanta asocia oficisto, S-ro J. Baroch, ke la oficejo estas fermata kaj ĉia agado estas malpermesata. Strangan sperton ni akiris ĉe tiu okazo. La du Gestapanoj trarigardis niajn ejojn, ordonis montri la kasenhavon kaj provizon da poŝtmarkoj, kiujn ili enpoŝigis kun du dekduoj da Esperanto-krajonoj. Per tio la agado de la Asocio estis finita. Nia Prezidanto, S-ro J. Friedrich havis la kuraĝon sin prezenti al la komandejo de la Gestapo por demandi, kial oni fermis nian oficejon. Dum dua vizito

oni diris al li, ke Esperanto estas malpermesita kaj oni ordonis al ni likvidi nian asocion. Por la likvidiĝo oni malfermis al ni la oficejon.

Do restis nenio plu farebla krom likvidiĝi, kaj tio efektiviĝis en Praha la 13an de novembro 1940. Ni malluis nian oficejon kaj disvendis nian libroprovizon.

Ankaŭ la lokaj grupoj estis devigitaj sin likvidi je diversaj tempoj, iufoje per simpla ordono, iufoje per bruteco. Al S-ro Berka en Brno, eldonanto de "Malkaraj Esperanto-Libroj", brue venis la Gestapo kaj kun kriegado eljetis la tutan lian libroprovizon tra la fenestro en aŭtomobilon, kiu poste ĝin forportis kiel malnovan paperon. Plej longe daŭris la Klubo en Praha, kiu ekzistis kvazaŭ sekrete, nenion anoncanta al la polico ĝis jaro 1944. Tion oni ŝuldas al la Prezidanto, S-ro J. Ŝustr. Tamen fine ili venis ankaŭ al li kaj ordonis likvidiĝon. Dank' al liaj prudento kaj kuraĝo savigis la valora kluba biblioteko. Ankaŭ aliaj grupoj sukcesis savi siajn bibliotekojn, plej ofte tial, ke la anoj forportis la librojn en siajn loĝejojn por ilin poste redoni. Tamen eĉ tio ne estis sen danĝero. La polico venadis en privatajn domojn de Ĉeĥoj kaj esploradis privatajn bibliotekojn por konstati ĉu ili havas malpermesitajn librojn. Estis neagrabla kaj danĝere ĉar ne ekzistis iaj listoj da malpermesitaj libroj!

La teruriga agado de la Gestapo estis efektive tre severa. Pardonu al Ĉeĥo konstatar pri sia persona impreso, cetere tre malfacile kontrolebla ĝis nun. Ŝajnas al mi, ke laŭ tio, kion mi ĝis nun legis kaj aŭdis la krueleco de la Gestapo estis la plej granda en la Protektorato. Ĝi estis siaspece justa en tio, ke ĝi trafis ĉiujn klasojn kaj rangojn. Do, ankaŭ Esperantistojn ĝi atingis. Multaj estis arestitaj kaj trafis en koncentrejojn aŭ pundojn. El la plej konataj samideanoj mortis aŭ estis murditaj la ĉiam tre aktiva Robert Bloch kun sia edzino el Praha, la eminenta kuracisto D-ro J. Marek el Ml. Boleslav: kaj inter la arestitoj estis R. Hromada, kiu pasigis kvar jarojn en koncentrejoj, kaj vicprezidanto de nia Asocio O. Ginz, kiu pasigis tie proksimume unu jaron. Lia filo 17-jara post 4-jara enkarcerado en koncentrejoj ne revenis. Ni intencas fari detalan statistikon pri ĉiuj Esperantistoj arestitaj aŭ mortigitaj de la Gestapo.

“KVAZAŬ PER LA MANO . . .”

Vesperigaĝas. Mi sidas en apogseĝo ĉe la kamento, kie gaje flamas fasko da vitbrancĉoj. En la manoj mi havas ĵus ricevitajn broŝuron, kies titolo “Kvazaŭ per la mano . . .” scivoligis min. Kaj la antaŭparolon mi komencas legi:

“Ĉi tiu libreto estas nek gramatiko nek lernolibro nek ekzercaro.

“Ĝi ne celas instrui la lingvon, sed nur disponigi al praktikaj Esperantistoj kelkajn konsilojn kaj rimedojn por solvi la lingvajn problemetojn, al kiuj foje ili albatigaĝas jen skribante leteron, jen legante iom insidan tekston, jen (precipe) tradukante esperanten el la propra lingvo. Kiu el ni ne haltis, haltas aŭ haltos, perlekse gratetante al si la vereton, antaŭ unu el tiaj problemetoj? Nu, ĉi tiu volumeto nenian alian celon havas ol minimumigi la daŭron de l’vertograto.

“Ĝi do estas kompendio, helpilo aŭ prefere kondukilo, kiu al la serĉata solvo ŝanceligantas Esperantiston kondukos kvazaŭ per la mano . . .

“Ĉu nia lingvo, kiom oni propagandas facila, prezentas tiom da malfacilaĵoj? Tute ne. Eĉ ne unu.

“Tamen en la kuranta praktiko ekzistas ja malfacilo, eĉ malfacilego, kiun ĉiu el ni renkontas de tempo al tempo. Do, en la lingvo? Ne, ankoraŭfoje ne. Nur en nia kapo. Kaj ĝi estas: “Ne bone scii, kion ni havas por diri”. Se ĉiu, ĉiam, bone scius “kion li havas por diri”, esperantajn tekstojn oni nepre verkus klaraj, korektaj kaj elegantaj. Tio estas la ĉefa, baza principo por bona praktikado de la lingvo. Tion oni neniam forgesu, kaj oni vidos, kiom ĝi ĉion glade glatigas.

“Bedaŭrinde, ĉefe pro influo de la nacilingvoj, ne ĉiu sukcesas sen helpo apliki tiun oran principon.

“Pro tio, ĉi tiu Kondukilo estas kompilita.

“En ĝi oni ne trovos la dekseks regulojn de la Fundamento: are aŭ dise oni legas ilin en ĉiu lernolibro.

“Oni ankaŭ ne trovas analizojn, teoriojn, proponojn, k.s., ĉiujn aferojn interesajn kaj valorajn certe, sed kies esploro kaj studo postulas multan tempon, fakajn konojn kaj speciale ekzercitan cerbon. Ankaŭ same vane oni serĉus ĉe la klarigaj ekzemploj, tiujn “sed oni povas ankaŭ diri . . .” aŭ “tamen kelkaj aŭtoroj uzas . . .”, kiuj okazaj, preskaŭ esceptaj dirmanieroj samrangigas tiel formojn aŭ turnojn ĝenerale uzatajn. Tia eklektismo povas plaĉi eĉ utili al rafinitaj stilistoj, sed la “normalan” Esperantiston ĝi nur perpleksigas. Post sesdek jaroj da uzado, ŝajnas ke nun estas tempo

por kribrado, almenaŭ lerneja, kiu apartigu sporade provitajn formojn de la pli ĝenerale uzataj. Cetere ĉu Zamenhof mem ne antaŭcelis tiun procedon ĉiufoje, kiam li tuŝis la temon pri natura evoluado de la lingvo?

“Kompense, en ĉi tiu verketo oni trovos, kun taŭgaj kaj klaraj ekzemploj zorge elektitaj kaj komentitaj, regulojn eligantajn el la Fundamenta Ekzercaro aŭ el la ĝenerala uzado de Zamenhof kaj de niaj plej bonaj aŭtoroj. Regulojn . . . aŭ pli ĝuste procedojn por utiligi kiel eble plej korekte kaj oportune la esprimeblojn, kiujn al ni la aŭtoro de Esperanto provizis.

“Tiel ke, sekvante ilin, praktika Esperantisto estu certa, en la plejmulto de la kazoj, trafi la ĝustan dirmanieron aŭ, almenaŭ, en kelkaj dubigaj okazoj, eviti tro krudajn erarojn.

“La kompilitoj emas kredi, ke per tio ili utilos same al la freŝaj Esperantistoj kiel al la mezaj kaj ankaŭ—kial ne?—al la kleraj.

“Tamen al tiuj lastaj la kompilitoj afable direktas peton: bonvole ili atentu kaj memoru, ke ĉi tiu libreto celas ne personojn riĉajn je talento kaj liberaj horoj. Tiuj ĉi ja estas memstaraj homoj kaj knedas mem sian stilon. Helpeman manon ili ne bezonas, kaj ili ja scias kiel konduki: ilin “kateni per la unu reguloj” oni ne provu. Tio, cetere, estus nura senencaĵo.

“Pli modeste kaj praktike la kompilitoj ŝovas sian Kondukilon al la modesta kaj praktika Esperantistaro, kiu, ne strebante fariĝi poetaro aŭ verkistaro, simple deziras paroli kaj skribi plej “honeste” kiel eble.

Tintas argenta voĉeto dum eta mano karese tuŝas mian genuon:—Paĉjo, paĉjo! Vekiĝu! La ŝupujo jam staras sur la tablo . . . Ĉu “Kondukilo” restos nura revo?

GEORGES AVRIL (Francujo)

Spite de la silentiga subpremado de la Gestapo, la flameto de la Esperantismo bruletis kaŝite sed ne estingite. Bedaŭrinde en Praha eĉ ne unu fojon la Esperantistoj povis helpi al samideanoj fremdlandaj, kiuj fuĝis el germanaj militkapitejoj.

Post la liberigo de la lando en 1945 tuj reekvigligis la Esperantista movado. Bedaŭrinde la materiala situacio de la lando estas treege malbona sekve de la Germana okupado. Inter aliaj aferoj, mankas papero. Kiam la situacio pliboniĝos, ni esperas rekonstrui tre vivan movadon. Cetere nia Asocio jam akiris kelkajn sukcesojn.

Dr. Stan Kamaryt, Vic. Prez. de Esp.

Asocio de Ĉeĥoslovaka Respubliko
11an Nov. 1945

FAKMOVADOJ

Oni ofte parolas pri la fakmovadoj. Kio tio estas ?

Jam de longe en la esperantomovado oni vidas starigon de asocioj, kies celoj estas uzi kaj uzigi Esperanton en iu speciala medio : radio, medicino, poŝto, filatelo k.t.p. Tre ofte tiuj fakasocioj agadis dum kelka tempo kaj finfine diserigis kiel vaporakvo en la aero. Tamen oni povas konstati, ke kelkaj daŭris ; ni povas aparte mencii la Senaciacan Asocion Tutmondan, bone konatan per la nomo mallonga SAT, kiu estas vere tute speciala faka movado. Ĝi okupis en la esperantomovado tiom da loko, ke oni konsideris ĝin kiel ĝeneralan asocion por Esperanto ; tamen ĝi vere estas fakasocio, efektive ĝi havas specialan celon. La Internacia Ligo por Esperanto en Poŝtoj, Telekomunikoj kaj Transportoj antaŭmilitis estis bone konata per la nomo Internacia Ligo de la Esperantista Poŝt- kaj Telegraf-Oficistaro antaŭ ol ĝi kuniĝis kun la transportistoj ; ĝi aperigis la Interligilon de l' P.T.T., kiu estis unu el la plej belaj revuoj en Esperanto. Nur la milito ĝin haltigis, sed de nun tiu ĉi Ligo reagadas kaj baldaŭ la Interligilo reaperos.

Kia estas la ĝenerala celo de tiuj fakaj asocioj ? Montri en la specialaj rondoj, ke Esperanto vivas, ke tiu ĉi lingvo povas doni de nun tre interesajn utilaĵojn. Ni devas aldoni, ke la Interligilo de PTT estis la sola revuo por la PTT-istoj eldonita de la personaro sur la internacia kampo kaj tio en kiu ajn lingvo ! Nur Esperanto tion permesis. Ĉu ne tio donas altvaloran argumenton por la Esperanta propagando ?

Nu en nia nuntempa postmilita epoko, kiamaniere la fakaj movadoj devus reagadi ?

Laŭ nia sperto en PTT-rondoj ni konfesas, ke ni antaŭvidas la fakan literaturon en Esperanto kiel sekvas :

Ni devos celi aperigi belajn ilustritajn revuojn, sur sufiĉe bona papero, por la diversaj fakoj. Tre certe tio estas malfacilaĵo en nia malfeliĉa Eŭropo, sed ni nun povas diri, kion ni farus se la papero estus je nia dispono, kiel antaŭmilite.

Por ke tiuj revuoj povu vivi, necesus ke ili ne estu tro multenombraj ; estas pro tio, ke ni antaŭvidas nur kvar fakrevuojn :

1. La Interligilo por Poŝtoj, Telekomunikoj kaj Transportoj, inkluzive de Filatelo, kaj Radio ; tio estas la komunikrimedoj.

2. Revuo por la Sciencoj kaj la Artoj, por profesoroj, instruistoj, literaturistoj, scienculoj.

3. Revuo por la Komercio kaj la Industrio inkluzive de la bankoj, asekuroj k.t.p.

4. Revuo por la laboristoj, sindikalistoj, anoj de laboristaj politikpartioj.

Tiele la plej granda parto de la homa aktiveco certe trovus organizaĵojn por la tutmonda uzado de Esperanto. Restus nur aferoj religiaj, kiuj sin kontentigus laŭ ebleco.

Se la Esperantistoj denove agus kiel antaŭmilite, eldonante nur malgrandajn bultenojn, kiuj ne havus belan aspekton, kiuj estus mimeografe presitaj, la ĝenerala movado ne povus trovi en la fakaj organoj la necesajn argumentojn por montri la taŭgecon de Esperanto.

Ni ne havas, kompreneble, la povon trudi al la Esperantistaro tiun vidpunkton. Ni ĉiuj ŝatas la liberecon—kiu dum multe da jaroj ja mankis al ni!—estas do nur konsiloj, kiujn ni antaŭmetas antaŭ la Esperantistaron. Pripensu tiujn ideojn se vi deziras agi sur la internacia kampo, kaj rigardu ĉirkaŭ vi, ĉu ne jam estas fakmovadoj al kiuj vi povus aliĝi. Dise ni nenion trafos, sed are ni povas esperi . . .

Robert Filliâtre, Ĝenerala Sekretario de la Internacia Ligo por Esperanto en Poŝtoj, Telekomunikoj kaj Transportoj.

PRINTEMPA KREDO

DE GOTTFRIED KELLER (*

Migradas bela sanktleĝendo

Kun violodor' sur nia ter',

Sopire, kvazaŭ amplendo

Tagnokte vagas kun esper'.

Sopiras ĝi pri monda paco

Kaj pri feliĉo de l' homar',

Pri ora temp' kaj ĝia graco

Kaj amo tiam ne erar'.

Popoloj ĉiuj tiam preĝas

Al unu patro, reĝ' kaj Di',

Profetoj sanktaj tiam reĝas,

Justeco jam ne utopi'.

Tial nur unu hont' ekzistos

Nur unu peko en la mond',

Se iu kun envi' rezistos

Kontraŭ bonfarto de l'estont'.

Kaj kredas ĉion li perdita

Neadas ĉion kun aplomb',

Li bone estus ne naskita,

Ĉar viva loĝas jam en tomb'.

*) Fama ĝermansvisa poeto 1819-1890
Tradukis K. Jost, Svisujo

ESPERANTO KAJ RADIO

Dimanĉo	(?)	Lille (Francujo). Detaloj mankas.
Lundo	21.20-21.30	Praha 1 (Ĉeĥoslovakujo) 1571 kaj 269.5. Informoj politikaj, kulturaj, ekonomiaj. Radio, Stalin-str. 12, Praha XII.
	22.00-22.15	Praha 1 (Ĉeĥoslovakujo) 49 92m. Informoj kiel supre.
	22.00-22.15	Varsovio (Polujo). 49 06m Informoj. Pola Radio, Koszykowa 8, Varsovio.
Mardo	21.20-21.30	Moravska Ostrava (Ĉeĥoslovakujo) 325.4m. Informoj kiel supre. Radio Moravska Ostrava.
	22.00-22.15	Praha 1. 49 92m (kiel je lundo).
Merkredo	18.00	Sofio (Bulgarujo). 352m. Parolado.
		(orienta tempo).
	22.00-22.15	Praha 1. 49 92m. (kiel je lundo).
Ĵaŭdo	21.20-21.30	Praha 1. 1571 kaj 269.5m. (kiel je lundo).
	22.00-22.15	Praha 1. 49 92m (kiel je lundo).
Vendredo	14.45 (?)	WRJN Racine (Wisconsin, Usono). Parolado, muziko, kurso. S-ro S. Klukowski, 3233 S. Springfield Ave., Milwaukee 7, Wis., Usono. Pluaj detaloj mankas.
	20.30-20.45	B.N.R.O. Kortrijk (Belgujo) 202.3m. Parolado. Zender Kortrijk van de B.N.R.O., Rijselstr. 36, Kortrijk.
	22.00-22.15	Praha 1. 49 92m (kiel je lundo).
Sabato	18.30-18.45(?)	(nur je la dua sabato de ĉiu monato) 3 S.R. (Aŭstralio). 238m. Novajoj.
	19.00-19.45(?)	PRA 2 (Brazilo). Paroladoj pri Esperanto. Ministerio por Edukado kaj Saneco, Praca da Republica, Rio de Janeiro, Brazilo.
	22.00-22.15	Praha 1. 94 92m. (kiel je lundo).

En la tabelo la horoj de la Esperanto-dissendoj, se ne alie indikitaj, estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Demanda signo post la horo signifas, ke ni atendas informon pri la hor-sistemo laŭ kiu oni kalkulas. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratulleterojn kaj informojn pri ricevado.

Ni avizas niajn legantojn ke la dissendoj el Praha kaj Moravska Ostrava je la 21.20 sekvas la novaĵojn en Ĉeĥa lingvo. Pro tio la Esperanto-dissendojn oni ofte ne komencas ĝis eble la 21.30.

A. C. OLIVER, Anglujo.

BELA ATESTO

Mi aŭdis diskuton pri la Judoj, aŭdis ĝin en la nordo, tre proksime de la polusa cirklo —do, malproksime de Jerusalemo! Sed la diskuto kaj la disputo ekscitigis kaj fariĝis varmegaj eĉ en tiu malvarmega regiono. Mi aŭdis kaj memoros ĉiam la vortojn de konata Finna ĵurnalisto: "Mi amas la Judojn. Ili donis al mia vivo du plej valorajn idealojn—la Bibliion kaj Esperanton."

Martti Putaala, Finnlando.

GERMANUJO

Kun permeso de la aŭtoritatoj oni jam starigis en Hamburgo Esperantan organizaĵon kun la nomo Hamburga Esperanto-societo. La provizora estraro estas: 1a prezidanto, Oscar Bünemann; 2a prez. Hermann Theobald; 1a sek. Oskar Peters; 2a sek. Mary Millies; kasisto, Felix Epstein.

Oni decidis, ke la agado pli ol iam okazos sub la gvido de la Zamenhofa klopodado por tuthomara frateco kaj paco.

RECENZOJ

*—akireblaj ĉe I.E.L.

* **D-ro Dornier.** Originala verko de H. L. Egerrup. Dansk Esperanto Forlag, Aabyhøj 1945. 208 pp. 8 ŝil., aŭfranko 6p.

La celo de la aŭtoro de ĉi tiu verko estas klarigi kaj disvastigi sian teorion pri la plibonigado de la homa raso per la arta gravedigo de virinoj per spermatozooj produktitaj de elektitaj viroj. La formo de la verko estas suzopeble kondiĉita de la deziro de la aŭtoro tiel prezenti siajn argumentojn, ke ili vekos la intereson kaj altiros al si la aprobon de kiel eble plej granda nombro de la publiko. Laŭ la eldonista resumo sur sia dorso, *D-ro Dornier* estas "interesege romano"; fakte, ĝi konsistas el kelkaj kvazaŭ-enkondukaj mallongaj rakontoj kaj unu pli longa historio. La rakontoj priskribas interalie la evoluadon de la pensado de la aŭtoro kaj diversajn kazojn kaj cirkonstancojn, en kiuj la arta gravedigo estas dezirinda rimedo; la historio sekvas la procedon en unu kazo kaj servas samtempe kiel montrofenestro, en kiun la aŭtoro metas ĉiujn siajn argumentojn por la utiligado de lia rimedo, donante respondojn al eventualaj oponoj kaj klarigante la avantaĝojn de la metodo.

Nur fakulo estus kompetenta kritiki la sciencan bazon de la verko. Oni scias, tamen, ke en diversaj partoj de la mondo la arta gravedigo estas jam rutina afero ĉe la bestbredado, kaj ke eksperimentoj estas faritaj en kelkaj landoj pri la aplikado de la sama tekniko al la membroj de la homa raso. En Britujo oni diro pri tiaj eksperimentoj vekis indigniĝon ĉe religiemiaj homoj, kiuj kredas tian procedon blasfema kaj kontraŭdia, kaj oni levis la demandon en la brita parlamento. La nereligieca homo, siaflanke, leginte ĉi tiun verkon, eble sentos, ke la aŭtoro pritraktas la aferon tro multe el la vidpunkto de veterinaro aŭ de brutbredisto, kiu atentus ekskluzive pri la korpaj karakterizaĵoj kaj neniel pri la animaj. Ĉie en la pledado por la enkonduko de la arta gravedigo la emfazo estas sur la graveco de la fizikaj ecoj de la eventualaj gepatroj; malofte la aŭtoro eĉ tuŝetas la psikan demandon, krom eldiri, ke korpore sana heredaĵo nature sekvigas mensan sanon. La akcepton de la argumentoj ne favoras la simileco de la rezultoj al tio, kion faris la germanaj nacisocialistoj, kuraĝigante kaj stimulantem la eksteredzegan naskadon de infanoj fare de korpore sanaj viroj. Tute ne koncernante sin pri la konvencie morala aspekto, oni povas ankaŭ demandi al si, ĉu entute estas dezirinde, el la vidpunkto de la estonteco de la homa raso, ebligi kaj faciligi

al senedzaj virinoj porti en la mondon infanojn, kiuj—pro la fraŭleco de siaj patrinoj—devos travivi sian infanaĝon kaj poste maturiĝi sen la influo de patro. Verdire, la propono vekas tre multe da interesaj kaj incitaj demandoj: pli multe ol oni povas eĉ menci en la malvasta kadro de literatura recenzo; sed kian ajn opinion oni formas pri la meritoj aŭ malmeritoj de la teorio, oni devas ĉiuokaze allasi, ke la verko estas interesa kaj vigla laŭ prezentado, kvankam ĝia literatura valoro ne estas alta.

Lingve la verko estas ĝenerale kompetenta; inter la malmultaj makuloj estas menciindaj la ĉiea uzado de *escepte* anstataŭ *krom*, kaj la formoj *aliu*, *aliel* kaj similaj. *Abnorma* kaj *asistento* ŝajnas esti nenecesaj neologismoj, kies signifoj estas respektive *nenormala* kaj *helpanto* aŭ *helpisto*. *Dum kiam* estas pleonasma kombinaĵo, kiu diras nenion pli ol *dum*. Troviĝas iom granda nombro da preseraroj, sed pro la specialaj cirkonstancoj oni indulgu ĉi-rilate la eldonistojn, kiuj sendube devis multe klopodi por aperigi ĉi tiun ambician verkon tiom baldaŭ post la liberigo de sia lando.

ALEC VENTURE, Anglujo.

* **La Esperantista Studrondo:** de Alf Hasle. Eld. Norvega Esperantista Ligo, Oslo 1942. Broŝ. 24p. 6p., aŭfranko 1p.

Nur unu intenco povis inspiri ĉi tiun libreton, nome, sincera deziro disponigi al la Esperantistaro, aparte al ties pli junaj anoj, la frukton de praktika sukcesplena sperto pri studgvidado. Konsideriga estas la eldona dato. Se en tia tempo, spite ĉiajn malhelpaĵojn oni sukcesis fondi kaj funkciigi en Norvegujo tian fervoran studrondon, ke la studestro sentas sin devigata fari raporton pri ĝiaj aktivaj, profite al siaj ĉiulandaj kolegoj, tio jam devus esti forta kuraĝigo.

Grandparte la konsililoj pri gvidado de grupa vivo konformas al bone konataj kaj fidindaj principoj, kaj verŝajne ilin iom ĝenerale jam praktikas la estroj de junularaj organizaĵoj. Tamen ĉiu klubgvidanto certe trovos ĉi tie materialon helpan kaj sugestoplanan. Kaj la studaj kaj societaj flankoj de grupa aktiveco estas pritraktitaj. La verkinto ne nur montras sin tre kompetenta teoriisto, sed evidentigas plenan posedon de la psikologiaj ecoj de bonega grupestro.

Esenca diferenco distingas la studrondon *Verda Fervoro* de la kutima grupo aŭ junula klubo. Anstataŭ allogi kiel eble plej multe da membroj, oni celas grupigi la studentojn laŭ temperamentoj kaj studceloj. Supozeble granda loka organizaĵo—ekzemple en

urbo, kie troviĝas kelkcentoj da Esperantistoj—dividiĝus en multajn rondojn, ĉar opinie de la aŭtoro, “7-8 personoj estas la maksimumo”.

S-ro Hasle prave insistas pri la graveco de serioza, persista studado, aparte per laŭtlegado de bonaj tekstoj. Preskaŭ ĉiuj studmetodoj kaj gvidrimedoj ĉi tie proponataj, eĉ la malpli ortodoksaj, meritas la atenton de la juna postmilita Esperantisto.

Lingve la verkajeto estas bona, spite misuzon de kelkaj vortoj (ekz. *precize* anst. *akurate*). Interesa neologismo estas *slagro* (Germ. *Schlager*; Angla=*song-hit*).

La formato estas plaĉa kaj la presado tre ĝusta.

E. G. Lock, Anglujo.

Que é o Esperanto ? Portugallingva broŝ. 61p. grafika servo donacita de Instituto de Geografio kaj Statistiko, Brazilo.

Inter la tre interesaj broŝuroj omaĝantaj la Dekan Brazilan Kongreson, la plej efika kiel propagandilo al varbado de portugallingvanoj estas *Kio estas Esperanto?* Ĝia enhavo, zorge kompilita de Brazila Ligo, alloge kaj lerte sin turnas en la portugala lingvo al ĉiuj, kiuj ne konsentas pri la virtoj de Esperanto ne konantaj ĝin.

Per *Que é o Esperanto* la afero tute klariĝas. Escepte de ignorantoj, kies intereso al ĉio ajn estas ĉiam fia, ĉiu post la legado komprenos la utilon de la helpa lingvo kaj eble per tute nova stranga inspiro, ekkonscios ke Esperanto, en sia internacia rolo povos agi en estontaj tempoj tiel, kiel siatempe efikis la preso.

La verko estas prilaborita laŭ la sistemo de *de Saussure*; ĝi enhavas la principon de neceso kaj sufiĉo por konvinki la plej kontraŭstaremajn kaj skeptikajn.

Saldanha Carreira, Portugalujo.

La Glicerodoj de Norvegujo ; La Norvegaj Ofeliedoj : La Skalibregmedoj de Norvegujo. Ĉi tiuj tri sciencaj verkoj, numeritaj 51, 52 kaj 55 respektive, estas traktatoj pri marvermoj, kaj estas originale verkita en franca lingvo de G. Stop-Bowitz, kiu provizas ankaŭ Esperantan resumon de ĉiu verko. Ili estas eldonitaj de la Zoologia Muzeo en Oslo.

AL LA TUTMONDA GEINSTRUISTARO

Ni salutas niajn kolegojn ĉie kaj alvokas ilin al kunlaborado. La unua paŝo estas la starigo de instruistaj asocioj *en ĉiuj landoj*. Jam ekzistas tiaj en Britujo kaj Francujo, bone organizitaj kaj agemaj kun siaj

bultenoj kaj regularo kaj elektitaj komitatoj. Eĉ nun ili kunlaboras.

Ni petas al niaj kolegoj, ke ili faru sian eblon formi similajn memstarajn asociojn. El tiuj kreskos internacia asocio.

Kiam landa asocio firme starigos, la Sekretario bonvole informu la administranton de T.A.G.E. por ke la novaĵo estu anoncita en *Esperanto Internacia*. Tiam kiel eble plej baldaŭ oni konsiligu pri interagado kaj eventuala internacia organizado; provizore la estraro de la antaŭmilita instruista organizaĵo T.A.G.E. faros la necesan centrigan laboron.

Prezidanto de T.A.G.E.,

R. W. HAMILTON, M.A.

Administranto de T.A.G.E.,

P. KORTE,

Schoolstraat 13, Veendam, Nederlando.

STROFOJ

Flugi volus mi
super monto alta,
flugi for ĝis vi
per flugil' senhalta.

Vesperigis jam
kaj mi ne ekiris ;
pri la velka am'
mi nenion diris.

Vento pelis for
la petalan rozon,
kaj la ruĝa flor'
ploras perlon rosan.

Tiel mia sin'
sub la bato sorta,
sangas ĝis la fin',
kiel flor' ne forta.

Lucien Thévenin, Francujo

NOKTOKANTO ĈE AMALFI

Ho steloj, kion mi donu
Al li, al mia amato ?
Respondo via—silento,
Silento sur ĉielplato !

Mi tion demandis la maron,
Kun veloj vagantaj enube.
Respondo ĝia—silento,
Silento sur ter' ĉi-sube.

Ho, doni mi povus ploron,
Aŭ kanton, jes, por li !
Sed *kiel* doni silenton
Vivlonge povos mi ? !

De Sara Teasdale :

Esp-igis Ernest Dodge, Usono

El Sara Teasdale : COLLECTED POEMS,
1937, laŭ permeso de la Macmillan Kio.,
eldonistoj.

ENHAVORICECO DE VORTOJ

Tomaso Lawrence, en sia fama verko *Ribelo en la Dezerto*, substrekiis la apartan emon de Araboj ŝati fortesprimajn vortojn. Verdire tiu ĉi trajto estas komunhoma. Kial kutimas la Judoj kaj la Angloj tiel ofte citi bibliajn tekstojn? Ĉu ne pro ŝatemo al okulfrapaj esprimoj? Kial estas preta la Ruso, laŭ atesto de sia propra proverbo, *vendi la patron kun la patrino pro bela vorteto*? Ĉiuj impresigemaj homoj entuziasme reagas je celtrafa esprimo.

Des pli ŝatas la belan, bontrafan kaj ideoriĉan vorton ni, la Esperantistoj, kiuj devas tre ofte, el niaj kelkcentoj da radikoj, per helpo de kelkdekoj da afiksoj, krei dum ĉia flua parolado novajn esprimojn, enkondukante novajn nuancojn kaj novajn konceptojn.

Kaj efektive, ekzistas en nia Esperanta trezorejo vortoj-gigantoj kaj vortoj-abismoj. Ekzistas esprimoj, komplikitaj multsignifaj; kaj ekzistas vortoj, danĝeraj riskaĵoj. Ekzistas vortoj, en kiuj lakone entrezoriĝas riĉega esenco, sed estas vortoj en la mal-koncizeco de kiuj kaŝiĝas troemfaza kaj neniondira sensencaĵo. Ekzistas esprimoj reprezentantaj tutan kompleksan de popola vivformoj; estas esprimoj respegulantaj sumigon de interna enanima homa travivaĵo.

Pro vorto, eĉ pro ununura vorteto, homoj ekscitiĝas, nobeloj duelas, popolamasoj demonstracias kaj regnestroj falas. Pro ununura vorto popoloj batalis, verŝis sangon, reĝoj estis detronigitaj, landoj ruiniĝis, homrasoj estis ekstermitaj, la mondo tremis...

Jes, ĝuste instruis la plejsaĝa Salomono: *Morto kaj vivo estas en dispono de lango*, (*Sentencoj* 18, 21). Ne senkaŭze oni kredas, ke per vorto estis kreita la kosmo kaj per vorto ĝi estas regata. *En la homenco estis la Vorto, kaj la Vorto estis kun Dio, kaj la Vorto estis Dio.* (Johano 1, 1).

Ĉu ne estas admirinda la multsignifa, ĉarma vorto, *etoso*? Uzis ĝin je la unua fojo K. R. C. Sturmer en sia original-esperanta romano *Por Recenzo*. Etoso — estas la animo de loko, ĝia interna spirito, laŭ nia subjektiva sento. Oni povas, ekzemple, paroli pri la sankta etoso de l' plormura ruino en Jerusalemo. Same multesprima estas la vorto, de la sama verkisto, *morna*, signifanta ion kortuŝe malgajigan, neterece timemigan. Oni povas paroli pri la morna etoso de Mortintulinso, laŭ la fama pentraĵo de Arnold Boecklin. Kaj la vorto *obscena* de Sturmer, signifas ion ofendan rilate al seksa morkompreno aŭ popolkutimoj de la koncerna medio.

Ekzistas vortoj — revelacioj. Kiam oni aŭdas ilin la unuan fojon, ŝajnas, ke la ĉielo

malfermiĝis kaj ia potenca brilego eklumis en nia cerbo. Mi mem almenaŭ sentis ion similan, renkontante lege je la unua fojo la simplan esprimon *Esperantujo*. Esperantujo — la abstrakte imagebla landpartujo de l' tutmonda nia samideanaro, senlimigita per difinita limkadro, troviĝanta pli en la korjoj ol en realo, sed tamen — realaĵo!

Parolante, ni semas oftokaze, pri-pensate aŭ senintence, arojn da profund-pensaj, multhavaj, signifiĉaj vort-kunmetaĵoj, sed la alktuimiĝinta orelo ne analizas ilin kaj ni ne emas enpenetri ĝis ilia fundo.

Unu Pola verkisto uzis iufoje ĉi-jenan frazon: *Nia klubo servis al ni, kiel amika kunligilejo*... Ĉu la lasta vorto ne estas riĉabunda trezoro? La kunmetado de prepozicio *kun* kun la verbo *ligi* faras kunligon. Aldonante la sufikson *ilo*, ni ricevas kunligantan instrumenton. Nun almetante la lokan *ej* ni ricevas lokon servantan tiucele.

Same orelfrapa estas la esprimo *enmemiĝi* — enprofundiĝi en sian propran internan travivaĵon. Uzis ĝin J. Beau, en sia traduko de *Colombo* de Prosper Mérimée.

Tre atentindan esprimon mi trovis en *Romano pri Afrika Bieno* de Olive Schreiner, tradukita de Stephen A. Andrew, en sekvanta dialogo (p. 164) *Sed povus esti, ke li kaptos ĝin*. — *Povus kapti! Sed li neniam kaptis kaj neniam kaptos. La vivo estas tro mallonga por ĉasi povusojn. Ni bezonas certajojn*... Povuso, kiel antiteza kontraŭmetaĵo al certeco, ĉu ĝi ne estas rimarkinda esprimmaniero? Kaj mi ĉiam antaŭe uzis similokaze la palan kaj sekan vorton *poveblo*. Domage!

Unu Ruso, dezirante diri, ke certa afero trodetas al li, afero, kiun li volonte estus sendinta al mil diabloj, elbuŝis, *La afero almiĝdiabliĝis al mi!* Li trafte tradukis samsencan rusan esprimon. Ankaŭ li trafte tradukis la titolon de unu el la verkoj de Leonido Andrejev, *Taglibro de Diablo*: *Notoj de enhomiĝinta Satano*. Unu ruzan malbonulon li nomis: *lupiĝinta vulpo*. Kiajn riĉajn elbojn prezentas nia lingvo!

Raymond Schwartz rimas en sia *Verdkata Testamento*, ke *filologo* estas la *fraŭlino alloganta filon*; ke *virt-emo virina* mal-aperas pro *vir-temo*; ke *sinjorina amuzo* estas *am-uzo*; ke la *bonan digeston* kaŭzas *Di-gesto*...

Nia meritplena Bulgara samideano I. Krestanov estas granda spiritulo. Unu fraŭlinon li nomis *kisindulinjo*.

J. Kohen-Cedek, Palestino.

LA ATOMA BOMBO

Lundo, la 6a de Aŭgusto 1945, estas unu el la plej gravaj datoj en la historio de la mondo—eble la plej grava. Ĉar en tiu tago la homoj unue uzis energion ĉerpitan el tute nova fonto; la atoma energio faris sian teruran debuton.

Oni povas diskuti la aferon el pluraj vidpunktoj—morala, politika, aŭ scienca. Ĉi tie mi diskutos ĝin precipe el scienca vidpunkto.

Ĝis la jaro 1945 la tuta energio, kiun la homoj uzis por plenumi la laboron de la mondo devenis malekte el la suno; t.e. el la eta frakcio, kiu trafas la teron, de la energio ĉiudirekten radiata de la suno.

La homoj uzis nur supraĵajn fortojn, kiuj troviĝas inter materiaj masoj, aŭ inter molekuloj, atomoj aŭ elektronoj. En ĉi tiu jaro ili komencis uzi la grandegajn fortojn, kiuj troviĝas en la nukleo de la atomo.

La historio de la homa progreso grandmezure konsistas en la eltrovo de novaj fontoj de energio kaj—afere multe pli grava kaj pli malfacila—de metodoj por ĝin regi. La homoj fine venis al la sojlo de la lasta stadio en tiu progreso.

En la jaro 1919 Lordo Rutherford sukcesis atingi la celon de mezepokaj alĥemiistoj, farante tion, kion la ĥemiistoj de la 19a jarcento deklaris nefarebla—la transŝanĝon de elemento per rompo de atomo.

Tion li faris post multe da provoj per bombardado de atomoj de nitrogeno, uzante *alfa*-radiojn kiel bombardilojn. La rezulto estas ke atomo de heliumo koliziis kun atomo de nitrogeno; ĉi tiu kaptis parteton de la atomo de heliumo kaj tiel estiĝis pli peza kaj pli malpeza atomoj (de oksigeno kaj de hidrogeno).

Oni povas koncize prezenti tion, kio kredeble okazis per la sekvanta ekvacio, skribante supre la atoman nombron kaj malsupre la atoman pezon (proksimuman)



Ĉe ĉi tiu kolizio estiĝis izotopo de oksigeno (A.P. = 17) ne ordinara oksigeno (A.P. = 16).

La ŝanco, ke unu el milionoj da partetoj trafu nukleon de atomo, estas tre malgranda; (ĝi plenigas nur etan frakcion de la tuta spaco, kiun okupas atomo); due, la *alfa*-radioj, kiel ankaŭ la nukleoj de atomoj de nitrogeno, portas ŝarĝon de pozitiva elektro, kaj similaj ŝarĝoj repelas unu la alian.

Ĝis la jaro 1932 oni konis nur du specojn de partetoj—la *elektronojn* kaj la *protonojn*, kiuj ambaŭ portas elektrajn ŝarĝojn. Tamen en tiu jaro Profesoŝo Chadwick eltrovis novan specon—la *neutronojn*, kiuj havas la saman pezon, kiel protonoj, sed ne

portas ian elektran ŝarĝon. Tial ili estis multe pli taŭgaj por uzado kiel bombardiloj, ĉar uzante ilin, oni evitas la duan malfacilaĵon. Pro la eltrovo de la neutronoj oni jam povas klarigi la ekziston de pluraj izotopaj elementoj kun la sama A.N., do kun la samaj ĥemiaj proprecoj, ĉar oni povas supozi, ke la nukleoj enhavas malsaman nombron da neutronoj; tio influas la atoman pezon, sed ne la elektrajn ŝarĝojn en la atomo, do la ĥemiaj proprecoj restas sensanĝaj.

Ekzemple, miksitaj kun ordinara hidrogeno oni lastatempe eltrovis, ke ekzistas t multe da alia elemento, kiun oni nomas *deuterio* aŭ peza hidrogeno. Ĉi tio havas la samajn ĥemiajn proprecojn kiel ordinara hidrogeno, sed la atoma pezo estas duoble pli granda; do oni konkludis, ke la nukleo enhavas neutronon krom protono kaj ke kiel ĉe ordinara hidrogeno, ĉirkaŭ la nukleo cirkulas nur unu elektrono. Kiam ordinara hidrogeno kombiniĝas kun oksigeno, estiĝas ordinara akvo (H_2O); do samtempe estiĝas malgranda kvanto da *peza akvo*, la oksido de deuterio (D_2O). Ĝi troviĝas en la naturo miksitaj kun 4000-oble pli granda kvanto da ordinara akvo. Estas granda laboro ĝin apartigi, sed se oni sukcesus apartigi sufiĉe grandan kvanton, tio provizus alternativan metodon por konstrui atoman bombon. Ĉi tiu estis la metodo preferita de la Germanoj; feliĉe por ni, kiel ankaŭ por la tuta mondo, ili ne sukcesis perfektigi sian metodon antaŭ ol ili venkis.

La eltrovo de neutronoj multe stimulis esploradon pri la strukturo de nukleoj, kaj Prof. Fermi en Romo, kiel ankaŭ multaj aliaj fizikistoj, pruvis, ke estas eble "ŝanĝi la korojn" de preskaŭ ĉiuj elementoj tiel, ke ili transŝanĝigas en aliajn elementojn. Per tio realiĝis la ĝenerala revo de la alĥemiistoj kaj iugrade eĉ la speciala revo pri la estigo de oro. Pli kredebla estas la aserto, ke oni sukcesis estiĝi oron el la eĉ pli valora metalo plateno. En ĉiu okazo la anonco pri tiaj pretendoj ne ekscitis multe da entuziasmo kaj ne kaŭzis krizon ĉe la borsoj, ĉar la kvanto estigita certe estis tre eta, kaj estas multe pli malmultekoste fosi oron el la tero. En sia fame konata *Vivo de D-ro Johnson* Boswell mencias Rusan alĥemiiston, kiu pretendis, ke li sukcesis estiĝi oron sed li rifuzis malkaŝi la metodon pro tio, ke scii ĝin ne estus profita por la homoj. Estas bedaŭrinde, ke la elpensintoj de la atoma bombo ne agis simile.

La esploroj de S-ro Joliot kaj lia edzino, kiu estis filino de S-ino Curie, montris, ke la bombardado de elementoj per *alfa*-radioj

kelkfoje estigas izotopojn, kiuj ne troviĝas en la naturo; tiaj izotopoj plej ofte estas nestabilaj ĉar ili elsendadas partetojn, kiel faras la nature radi-aktivaj elementoj kaj tiel transanĝigas en malpli pezajn elementojn. Oni nomis tiun fenomenon *artefarita radi-aktiveco*. Ilia esploro pri la efikoj de la bombardado de berilio kondukis al la eltrovo de neŭtronoj.

Oni precipe interesiĝis pri la efikoj de la bombardado al la plej peza el la elementoj—uranio (A.N.92; A.P.238.2). Unue oni provis klarigi la efikojn per la supozo, ke oni sukcesis estigi elementojn eĉ pli pezajn. Oni post tiu tempo ja sukcesis tion fari sed ne tiam.

Lise Meitner, helpistino de Prof. Hahn en Berlino, pruvis matematike, ke tio, kio okazas ĉe la bombardado de uranio, estas tute alia. Ĝis tiam, malgraŭ ĉiuj penoj, oni nur sukcesis rompeti atomojn, elpelante malgrandajn pecojn. Sed ŝi pruvis, ke en ĉi tiu okazo, atomo de uranio eksplodas kaj dividiĝas plej ofte en du proksimume egalajn partojn.

Tio estis decida paŝo ĉe la evoluo de la atoma bombo, kvankam oni certe ne pensis pri io krom pure sciencaĵo celoj. Ĉar Lise Meitner estis Judino ŝi estis forpelita el Germanujo.

Sekvante la indikojn de la matematika teorio, Prof. Hahn, kiu estis amiko kaj instruito de Lordo Rutherford, en la jaro 1938 plu esploris la aferon eksperimente kaj tiel confirmis la teorion. En januaro 1939 li eldonis raporton pri siaj eksperimentoj kun la titolo *Hemiaj Pruvoj pri la Fendado de Atomoj de Uranio*. Grandan eraron faris la cenzuristo permesante, ke oni presigu tiun raporton, kvankam la titolo sugestas ion senofendan kaj pure teknikan, interesan nur por ĥemiistoj; li efektive devus ordoni, ke la manuskripto ne presigu, sed ke ĝi estu konservata inter la plej sekretaj dokumentoj de la Germana ŝtato, ĉar ĝi eble estus tro danĝera se ĝi venus en la manojn de malamiko.

Sed la elemento uranio (A.N.=92; A.P.=238.2) efektive konsistas el tri izotopoj, jene:—

99.3% A.P.238; 0.7% A.P.235;
0.008% A.P.234.

Oni nomis ilin U_{238} ; U_{235} ; U_{234} . Nur la dua el ili estas uzebla por la bombo ĉar nur tiu estas stabila kaj povas eksplodi kiam oni bombardas ĝin per neŭtronoj.

Laŭ Hahn la rezulto de la eksplodo estas la estigo de la atomoj de la malofta gaso *kriptono* kaj la peza metalo *bario*.

En tiu okazo oni povas prezenti la aferon per ekvacio jene, skribante supre la atoman nombron kaj malsupre la atoman pezon:—

92 36 56
 $U = Kr + Ba$
235 83.7 137.7+13.6

la sumo de la A.N. de Kr. kaj Ba. estas 92, kiu estas la A.N. de ĉiuj tri izotopoj de uranio; tio estas ĝusta, sed la sumo de la A.P. estas nur 120.4 kiu estas 13.6 malpli ol la nombro, kiu "kontentigas" la ekvacion. Kiel oni klarigu la diferencon? Estas tri eblaj klarigoj, laŭ Hahn (ĉar neniu alia elemento estigas).

(1) Eble la kriptono kaj bario, kiuj estigas, ne estas la kutimaj formoj de la elementoj, sed pli pezaj izotopaj formoj (kiuj havas la saman A.N.).

(2) Eble estigas, krom atomoj, kiujn oni povas rimarki per iliaj elektraj kaj ĥemiaj proprecoj, unu aŭ pluraj neŭtronoj.

(3) Eble parteto de materio neniuĝas; tio klarigus la grandegan kvanton da energio, kiu liberigas.

Ekzistas diversaj opinioj pri la naturo de la elementoj estigitaj; pri tio vidu leteron en *The Listener* de 20-9-45, kiel ankaŭ leterojn en antaŭaj numeroj. Mi rimarku, ke laŭ raportoj pri la eksplodo de la bombo en Japanujo, malsimile al ordinaraj eksplodoj, neniu gaso liberigis rezulte de tio. Homoj, kiuj esploris la aferon poste trovis 16 substancojn tiel estigitajn.

La efikoj rezultas sole el la estiĝo de senekzempla varmego. Se tio estas vera, la supozo de Hahn estas erara; tamen estas eble, ke li pravas kaj ke la kriptono efektive estiĝis, sed ne rimarkigis, unue ĉar la kvanto estis malgranda, due ĉar en ĉiu okazo ĝi estas unu el la tiel nomitaj "noblaj" gasoj—elementoj similaj al heliumo, neono, argono, k.t.p., kiuj neniam konsistigas iajn ĥemiajn kombinaĵojn kaj tial ne povas esti rimarkataj pro siaj ĥemiaj proprecoj.

Tamen la energio de la eksplodo estas tiel grandega, ke oni ne povas supozi, ke la sumo de la nombroj en la ekvacio estas malpli ol 234 [taksante ilin laŭ konsideroj (1) kaj (2)]; la kvanto de energio estigita per la neniuĝo de materio kredeble ne povas esti malpli ol tiu, kiun estigas la restanta unuo—[laŭ konsidero (3)]—por ke la tuta sumo estu 235—la nombro, kiu kontentigas la ekvacion

La skribinto de la jam aludita letero en *The Listener* kalkulis, ke la varmo estigita de unu funto da U_{235} proksimume egalas tiun, kiun eldonas la brulado de 5000 tunoj da karbo.

Sed la plej grava fakto—tiu kiu ebligis la fabrikadon de la atomoj bombaj—troviĝas ĉe la dua el la tri konsideroj. *La eksplodo liberigas neŭtronojn*. La neŭtronoj liberigitaj per la eksplodo de unu atomo eble kolizios kun la nukleoj de aliaj atomoj, kiuj en tiu okazo eksplodas kaj mem elsendos

aliajn neŭtronojn, kiuj okazigos la eksplodon de ankoraŭ aliaj atomoj. Tial, se la procedo iam komenciĝos, estas kredeble, ke ĝi tre rapide daŭros, ĝis la tuta maso eksplodos.

Tamen la ŝanco de kolizio estas nur 1 en 100,000; do, ĉe tre malgranda maso de U_{235} ĝi ne okazas. Se la maso ne estas sufiĉe granda, la ŝanco, ke liberigita neŭtrono trafos nukleon, estas tre malgranda, kaj ĉar la neŭtronoj senofende foriras en la spacon, nenia konsiderinda eksplodo okazos. Sed en ĉiu maso de uranio nur .7% konsistas el U_{235} ; alie eksplodoj ofte okazus kaj tiu substanco estus antaŭ longa tempo malaperinta for de la tero. La ĝustan grandecon oni devas trovi per matematika kalkulado pri la ŝancoj.

Do la grandeco de atoma bombo devas kuŝi inter du limoj. Se oni provos fari bombon tro granda, ĝi eble eksplodos dum la fabrikado; se, aliflanke, oni faras ĝin tro malgranda, kiam oni faligos ĝin, nenio okazos. Utila eksplodo rezultos nur kiam oni subite kunmetas du masojn de U_{235} , kiuj aparte estas preskaŭ, sed ne tute, sufiĉe grandaj por fari eksplodon. Kia estas "utila eksplodo" mi priskribos poste.

En tiu cirkonstanco kuŝas la plej tragedia aspekto de la atoma bombo; se oni ĝin uzas, oni devas uzi ĝin por grandskala detruo. Ĝi estas strategia kaj ne taktika armilo; oni ne povas ĝin limigi al pure militaj celoj. Ĝi taŭgas nur por la detruado de ĉiuj viroj, virinoj kaj infanoj, kiel ankaŭ de ĉiuj vivantaj estaĵoj, kiuj troviĝas en vasta areo. Ĝi ne taŭgas por la detruado de aparta taĉmento, kazerno, arsenalo, fabriko aŭ fortikaĵo. Se oni provus ĝin uzi en batalo, ĝi detruus la batalantojn de ambaŭ armeoj senpartie.

En la komenco de la jaro 1940 du aŭ tri sciencistoj sendepende sugestis al la Brita registaro, ke eble oni povus utiligi la atoman energion de uranio por militaj celoj. Do la registaro starigis komitaton por esplori la demandon, ĉu tio estas ne nur teorie ebla, sed praktike farebla en limigita tempo—t.e. sufiĉe baldaŭ por infui la sorton de la milito, kaj ĉu la ŝanco de sukceso estus sufiĉe granda por pravigi la grandegajn laboron kaj elspezon, kiuj estus bezonataj por la celo.

Oni komencis esploran laboron en Britujo, sed post kiam Usono partoprenis en la milito, oni decidis daŭrigi la laboron en Usono kaj Kanado, kie la Germanaj aviadistoj ne povus ĝin malhelpi. Multaj Britaj sciencistoj—precipe Prof. Oliphant de Birmingham—transloĝiĝis al Usono por kunlabori kun la Usonaj sciencistoj pri la afero.

Sed la Germanaj sciencistoj samtempe faris similajn provojn. Ĉe la metodo, kiun

ili preferis, oni uzis "pezan akvon", kiun ni jam priskribis. En Norvegujo ekzistis fabriko por grandskale apartigi tiun substancon de ordinara akvo. Tiun fabrikan la Germanoj kaptis, kiam ili invadis Norvegujon; sed ili ne trovis tie iom da peza akvo, ĉar Francaj sciencistoj jam aĉetis la tutan kvanton haveblan, kaj la Germanoj devis entrepreni la malrapidan kaj tedan laboron denove. Preskaŭ la tuta ekzistanta provizo de peza akvo (165 litroj) en la komenco de la milito troviĝis en Francujo, kaj Francaj sciencistoj ŝtele eligis ĝin kaj transportis ĝin al Britujo, kiam ili mem devis transloĝiĝi tien pro la invado de la lando de la Germanoj.

La laboro estis ankaŭ malhelpita Britaj aviadistoj kaj Norvegaj sabotistoj sed precipe de aro da Norvegaj paraŝutistoj, kiuj venis de Britujo kaj kun mirinda kuraĝo, sukcesis eksplodigi grandan parton de la fabriko. Estas eble, ke per tiu farego, ili ŝanĝis la sorton de la mondo. La Germanoj provis transporti ĉiun maŝinaron, kiu restis nedetruiĝinta, al Germanujo por ke ili povu daŭrigi la laboron, sed Norvegaj patriotoj sciigis pri ilia intenco kaj metis bombon sur la pramon, per kiu oni devis transveturi kaj per ĝia eksplodo detruigis la aparato kaj mortis multaj homoj—Norvegoj kiel ankaŭ Germanoj.

Se Hitler estus pli inteligenta, li estus prokrastinta sian atenton ĝis la Germanaj sciencistoj estos eble elpensinta efektive decidigan armilon, kia estas la atoma bombo.

Por fari atoman bombon, unue necesas apartigi U_{235} de la aliaj izotopoj, giganta tasko kiu povas plenumiĝi nur per la kunlaborado de multaj sciencistoj kaj inĝenieroj en grandaj fabrikoj ekipitaj je grandega elspezo, kiun nur registaro povas facile elporti.

Eble la decidiga dato ne estis la tago de la publika debuto de la atoma bombo, sed la tago—iam en julio—kiam oni sekrete unu provis la bombon, ĉar oni ne certe sciis, ĉu la rezulto, kiam oni faligos ĝin, estos nenio aŭ egala al la eksplodo de 20000 tunoj de la ĝis tiam plej potenca eksplodaĵo konata—nome tri-nitro-toluol, kiun oni konas pli bone per la komencliteroj, T.N.T.

Estus bone, se tiu unua provo de la bombo estus ankaŭ la lasta eksplodo. Ĝi okazis je la 3a a.t.m. meze de la dezerto en la Usona ŝtato New Mexico. Ĝin priskribis Prof. Taylor en *The Listener* de 16-8-45. Li estis inter tiuj, kiuj observis la eksplodon je distanco de 20 mejloj de ĝi, rigardante tra tre malhela verda vitro. Homo, kiu ne faris tiun antaŭzorgon je distanco de 6 mejloj, blindiĝis. Aperis globo de fajro, kiu dum pluraj sekundoj, estis multe pli brila ol la tagmeza suno. Ĝi iom post iom

fariĝis nubo en formo de giganta agariko, kies altecon oni taksis je 40000 futoj. La sono ne estis tre laŭta. Ĝi similis al tiu, kiun kaŭzas proksima obuso; ĝi estis sekvita de reŝado dum iom da tempo.

Estas bonŝance por la Germanoj, ke ili jam senkondiĉe kapitulaciis antaŭ tiu dato; do ili neniam havis praktikan sperton pri la efiko de la atoma bombo. Antaŭ oktobro oni jam kaptis kelkajn insulojn sufiĉe proksimajn de Japanujo kaj la Japana aviadilaro ŝajne senpoviĝis (kvankam ĝi estis laŭdire plimultnombra ol iam); ankaŭ la militŝipoj detruigis. Tial oni decidis ne plu prokrasti uzon de la bombo kontraŭ Japanujo.

Oni faligis du bombojn sur Japanujon, ankam unu tia bombo estus pli ol sufiĉa; la unua detruis Hiroŝima, la dua detruis ne malpli ol trionon de la eĉ pli granda urbo Nagasaki. La efikoj de la bomboj estis malsamaj en la du lokoj. Ĉe Hiroŝima tute tra 25 ĝis 30 kvadrataj mejloj preskaŭ ĉiu domo ne nur ruiniĝis, sed tute malaperis; nur malmultaj tre fortaj muroj ankoraŭ staras, kiel ankaŭ kelkaj fabrikaj kamentuboj sen fabrikoj. En la sekvantaj tagoj oni kalkulis 53,000 homajn kadavrojn kaj 30,000 homoj tute malaperis senpostsigne. Ili estis plibonŝancaj ol la 13,000 grave difektitaj kaj eĉ ol la 40,000 ŝajne malmulte difektitaj, ĉar ĉi tiuj post pli aŭ malpli da suferado kredeble ankaŭ mortos. Estas stranga rezulto, ke vundetoj, kiuj en ordinaraj cirkonstancoj estus tute sen-signifaj, estis mortigaj; la karno putriĝas ĉirkaŭ la punkto, kie la haŭto estas pikita. Kiam oni esploris la sangon de la mortintoj, oni trovis nur seponon de la kutima nombro da leŭkocitoj.

En la *News Chronicle* de 12-9-45 ĉi tiujn efikojn diskutis Hungara sciencisto Plesch. Li diris, ke ili similas la rezultojn de eksperimentoj ĉe ranoj kaj aliaj bestoj pri a efikoj de radiaktivaj substancoj kaj li antaŭmetis demandon pri la ebleco, ke polvo danĝera pro radiaktiveco eble disvastiĝos per vento kaj igos nelegebla vastan areon.

Je la 9a de Aŭgusto ni eksciis, ke dua atoma bombo falis sur alian pli grandan urbon Nagasaki. Ĉe ĉi tiu bombo oni provis alian metalon kun la taŭge infera nomo *plutonium* aŭ plutonio. Oni atendis, ke la rezultoj multe pli superos tiujn de la unua bombo. Ili ja superis ilin en la senco, ke ili estis iom malpli teruraj kaj oni ne spertis la strangan postefikojn, kiuj okazis ĉe Hiroŝima. La kaŭzo de la malsamaj efikoj kredeble estas, ke ĉe Nagasaki la tereno estas pli monteca, kaj domoj lokitaj en valoj evitis la plenan forton de la eksplodo. Krome, la vetero, kiam la bombo falis estis bela, do la radiaktiveco baldaŭ malaperis.

Kontraŭe, ĉe Hiroŝima la tereno estas ebena; en la tago, kiam la bombo falis, multe pluvis, do la radiaktiveco restis en la tero. Kredeble kontraŭbombaj ŝirmejoj nur tre neperfekte ŝirmas kontraŭ atomaj bomboj. Tamen la nombro de la mortintoj kaj difektitoj estis multe pli granda ol ĝi alie estus, se oni ne estus farinta tragedian eraron. Kiam aeroplano forflugis, oni signalis, ke la danĝero jam forpasis. Oni kredis, ke la aeroplano flugis super la urbon kaj ne faligis bombon. Tamen la aviadisto nerimarkite ja faligis malgrandan bombon per paraŝuto. Tial la bombo falis malrapide tiel, ke li havis sufiĉe da tempo por forflugi antaŭ ol okazis la eksplodo. La eksplodo okazis en la aero efektive en la momento, kiam la homoj de la urbo ĵus eliris el la ŝirmejoj.

Nenia katastrofo, natura aŭ artefarita, iam kaŭzis al iu urbo en iu lando pli kompletan detruon. Oni taksas la nombron de mortintoj sekve de la du eksplodoj je ne malpli ol 150,000, eble multe pli, kaj la nombro de la difektitoj oni tute ne povas taksati. La sorto de ĉi tiuj lastaj ja estis mizera, ĉar en Hiroŝima ne malpli ol ses horoj pasis antaŭ ol oni povis penetri tra la brulantaj ruinoj por helpi la difektitojn.

Notoj pri fontoj. La oficiala raporto estas "blanka papero," *Statements relating to the Atomic Bomb* (H.M. Stationery Office, Londono, prezo 4 pencej.) La plej detala raporto, kiun mi vidis, estas en ses artikoloj en la gazeto semajna *Recorder* (Londono) inter 25-8-45 kaj 6-10-45.

Vidu ankaŭ la plej gravajn jurnalajn Britajn de la 7a aŭgusto kaj poste; kaj la *New York Times* de tiu dato. Oni resumis la artikolon de tiu ĵurnalo en la septembra numero de *Science Digest*. Duono de la septembra numero de *Discovery* estis dediĉita al tri artikoloj pri ĉi tiu temo kaj oni aldonis noton pri plujaj fontoj de informo. *The Listener* de 16-8-45 enhavas tri brodkastitajn paroladojn pri la atoma bombo de Prof. Geoffrey Taylor, Charles Darwin kaj Edward Appleton. Vidu ankaŭ leterojn en postaj numeroj. El pli ampleksaj verkoj mi aparte rekomendas *The World and the Atom* de C. Möller kaj E. Rasmussen (1938) eldonita de Allen & Unwin, kaj tradukita el la Dana lingvo.

T. L. C. BLUETT, *Anglujo*

BONVOLU

frue pagi vian kotizon por 1946.

Tio multe helpas al ni.

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

N-ro 177

OFICIALA INFORMILO

1an Dec., 1945

NOVAJ DELEGITOJ

Argentino

Buenos Aires. FD (Katolikismo) : D-ro J. A. Quiña González, St. Uruguay 714.

Belgujo

Antwerpen. D : G. Vermandere, Wetstraat 15.

Mechelen a/M. FD (Katolikismo kaj Turismo) : Prof. A. Beckers, Instruista Instituto. Tel. 16.

Britujo

Isleworth (Middx.). D : D. A. Poultney, Borough Road College. Tel. HOU 4302.

Reading. FD (Junulgastejoj) : F-ino L. G. Lawton, 22 Tamarisk Avenue.

Finnlando

Kouvola. VD : Heikki Varpainen.

Turku. D : A. Kylänpää, Parkintie 9, Turku 3.

Vilpula. D : Yrjö Rautio, Kotiniemi. Tel. 7.

Francoj

Ajaccio (Corse). D : P. Leca, 3 rue Fesch.

Blausac (A.M.). D : Petro Stojan, Blausac par l'Escarène.

Bucquoy (P. de C.). D : F-ino A. M. Delambre, rue Dierville. Tel. 15.

Desvrès (P. de C.). D : Achille Dumarquez, lernejestro.

Pau (B. Pyr.). D : S-ino E. Rivière, 68 rue Carnot.

Irlando

Béal an Atha (Ballina). D : L. O. Cuirc, F/c MacGabhann, Molloy Tce. Tel. 62. FD (Fervojoj) : La D.

Italujo

Brescia. D : G. Torri, Corso Vittorio Emanuele 66.

Cremona. D : L. Topi, Corso Garibaldi 34.

Forli. D : D-ro L. Taccani, Via Maroncelli 28.

Grottaferrata. D : Arturo Martellotta, Grottaferrata (Roma).

Parma. D : D-ro Prof. G. Canuto, Ospedale Maggiore.

Roma. FD (Turismo) : Rag. A. Blasimme, Piazza Epiro 36.

Torino. D : N. La Colla, Via S. Dalmazzo 12.

VD : E. Aprosio, Via Morghen 34.

FD (Fervojoj) : F. Ramolfo, Via Nizza 16.

FD (Komerco) : Rag. P. Castiglioni, Via Mazzini 39.

FD (Stenografio) : Cav. C. Roncolini, Via Cialdini 48.

FD (Transportoj) : F. Bandieri, Via Vincenzo Monti 3.

FD (Turismo) : M. Copelli, Corso Giulio Cesare 20.

Venezia. D : P. Torta, Salizzata S. Samuele 3358.

Verona. D : Rag. A. Reni, Via Rovereto

Nederlando

Barendrecht. D : Dick Ponti, Singel 29. Tel. 466.

Den Burg (Texel). D : T. Tiessen, Warmoesstraat 59.

Den Haag. FD (Muziko) : H. Valckenier, Daendelsstraat 64.

Haarlem. FD (Pentrado, Modelado) : S. de Paauw, Patrimoniumstraat 21.

Leeuwarden. D : P. Hendriks, Emmastraat 3.

Lochem. FD (Flegado) : S-ino P. H. van der Lek-Muns, Huize "Groene Maad."

Winschoten. D : S-ino L. de Vries-Kanning, Hoogstraat 14.

Portugalujo

Lisboa. FD (Instruado) : C. Fernandes Murteira, Rua Gonçalves Crespo 36-I.

Mirandela. D : J. Azevedo Lopes, Farmácia da Ponte.

Svedujo

Jönköping. FD (Orajistaj kaj gravuristaj aferoj) : Jack Snarberg, Lillgatan 44a. Tel. 1613.

Karlskoga. FD (Kooperativismo, Inĝenieraj aferoj) : H. A. Leijder, Vindarnas väg 4E, Karlskoga 5. Tel. 32331.

Västerås. FD (Elektrotekniko; teknika nomenklaturato) : S. Alexandersson, Jakobsbergsgatan 20 B. Tel. 38169.

Vimmerby. FD (Instruado) : Olle Olsson, Kampen (E. Winell). Tel. 9.

Svisujo

Zollikon. FD (Muziko) : W. Giannini, Kesslerstrasse 12. Tel. Zürich 249914.

ŜANĜOJ

Britujo

Bexhill-on-Sea. D : adresŝanĝo : 39 Sackville Road.

Chelmsford. D : adresŝanĝo : The Rectory, Little Waltham, Nr. Chelmsford.

London. FD (Radio) : adresŝanĝo : 18 Romeyn Road, S.W. 16.

Maroko

Casablanca. FD (Paper-fabrikado) : vakas. FD (Stenografio) : vakas.

Fez. FD (Ludilo-industrio) : vakas.

Portugalujo

Méda. VD : vakas.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1945

- 158. S-ro F. Moolenaar, Groningen, Nederlando.
- 159. S-ro L. Beoletto, Marseille, Francujo.

PATRONOJ 1946

- 1. D-ro F. J. Williams, Suva, Fiĝio.
- 2. S-ro G. van der Lijn, Uccle, Belgujo.
- 3. S-ro J.R.Grocott, Blackburn, Anglujo
- 4. S-ro D. Kennedy, Glasgow, Skotlando
- 5. S-ro A. C. Oliver, Rickmansworth, Anglujo.
- 6. F-ino F. L. Wickelgren, Buckhurst Hill, Anglujo.
- 7. S-ro J. L. Ford, London, Anglujo.
- 8. S-ro H. Jordan, Kidlington, Anglujo.
- 9. S-ro C. H. Toms, Freshwater, I.O.W., Anglujo.
- 10. S-ro T. J. Gueritte, Surbiton, Anglujo
- 11. S-ro R. F. Jervis, Slough, Anglujo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1946

- 1. S-ro C. P. Hehir, Kalgoorlie, Aŭstralio
- 2. S-ro R. Karlson, Montreal, Kanado
- 3. S-ro Saldanha Carreira, Lisboa, Portugalujo
- 4. S-ro Teixeira Lino, Fundao, Portugalujo
- 5. S-ro S. S. Culbert, Tacoma, Wash., Usono
- 6. S-ro A. Fisher, Parkstone, Anglujo
- 7. S-ro F. L. Gadsby, Birmingham, Anglujo
- 8. S-ro H. W. J. Gough, Portsmouth, Anglujo
- 9. S-ro D. B. Gregor, Swansea, Kimrujo
- 10. S-ro J. P. MacLean, Falmouth, Anglujo
- 11. S-ro M. Pearson, Sheffield, Anglujo
- 12. S-ro G. W. Roome, Sheffield, Anglujo
- 13. S-ro F. C. Rudman, Newport Pagnell, Anglujo
- 14. S-ro D. H. H. Searle, Plymouth, Anglujo
- 15. S-ro G. H. A. Turton, Huddersfield, Anglujo
- 16. F-ino E. E. Mason, Sutton, Anglujo
- 17. S-ro F. O. Bevan, Farnborough, Anglujo
- 18. S-ro T. L. C. Bluett, London, Anglujo
- 19. S-ro F. B. Bourdillon, Oxford, Anglujo
- 20. S-ro C. C. Goldsmith, Rickmansworth, Anglujo

- 21. F-ino A. F. Jobbins, Worthing, Anglujo
- 22. S-ro R. F. Latimer, London, Anglujo
- 23. S-ro J. R. Miller, Stone, Anglujo
- 24. S-ro H. W. Allen-Smith, Watford, Anglujo
- 25. S-ro W. Bailey, Dyserseth, Kimrujo
- 26. S-ro W. Chitty, Dover, Anglujo
- 27. S-ro C. H. Gibbs, Cardiff, Kimrujo
- 28. S-ro A. Hill, Birmingham, Anglujo
- 29. F-ino C. W. Hudson, Seaham, Anglujo
- 30. S-ro D. J. Langman, Birmingham, Anglujo
- 31. S-ro J. Lovell, Ruislip, Anglujo
- 32. F-ino A. G. Macfarlane, Glasgow, Skotlando
- 33. S-ro C. V. Mackenzie, Halesowen, Anglujo
- 34. F-ino E. M. Pearson, York, Anglujo
- 35. Prof. W. Ramsden, Oxford, Anglujo
- 36. F-ino E. Riding, Manchester, Anglujo
- 37. S-ro K. A. Sly, Slough, Anglujo
- 38. S-ro M. Stüttard, Blackpool, Anglujo
- 39. F-ino I. C. Fortey, Leicester, Anglujo
- 40. S-ro F. Curtis, Bristol, Anglujo
- 41. F-ino A. Fotherby, Surbiton, Anglujo

STATISTIKO

Jen la stato de la membraro je la fino de Novembro, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Novembro 1944 :

	1944	1945
Asociaj Membroj	3117	3964
Individuaj Membroj :		
MJ	730	1029
MA	1241	2225
MS	110	160
Patronoj ..	21	24
DM	71	85
HM	9	16
	2182	3539
	5299	7503

Kotizoj. Bonvolu frue pagi vian kotizon por eviti interrompon en la sendo de la gazeto. Post la nuna numero ni sendos ĝin nur al tiuj membroj kiuj pagis por 1946 aŭ kiuj estas Dumvivaj aŭ Honoraj Membroj.

DONACOJ por helpi al la forigo de la deficitio : E. A. Auer 2s. 9p., A. G. Tucker 42s., H. C. Allen 4s., G. C. Jervis 5s., R. Sharp 3s. 6p., F. C. Rudman 10s., C. F. Geddes 5s., S-ino H. de Vere 10s., W. G. Tillett 2s., F. L. Gadsby 5s., A. H. Middlemast 5s., S-ino C. Bowen, 4s., A. F. Smale 1s. 4p., F-ino G. I. Harrison 20s., T. L. C. Bluett 20s., E. M. Rosher 10s., C. H. Toms 20s., A. B. Grosvenor 5s., J. L. Ford 7s. 6p., R. M. Wilson 2s. 6p., R. Hamilton 2s. 6p., Taff 3s. 6p., C. T. A. King

1s., C. Harrison 2s. 6p., W. Chitty 10s., A. Hill 3s. 6p., F-ino J. Fox 5s., G. D. Edwards 10s., F-ino A. South 1s. 6p., F-ino M. E. Moss 5s., F. Curtis 9s., F. Wadham 4s., K. A. Sly 2s., F-ino E. M. Pearson 9s., P. C. Reilly 5s., T. J. Gueritte 25s., K. W. Martin 1s. 6p., Sennoma 2s. 6p., A. Morton 5s., F. Sutcliffe 2s. 6p., E. Hales 9s.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario*

KOOPERATIVA ESPERANTO-LIGO

La unua postmilita komitatkunveno okazis la 14an de Novembro 1945 en Londono. Estis konsentite de la Provizora Komitato, ke S-ro A. A. Ager, 8 Pelham Road, Beckenham, Kent, Anglujo estu Provizora Sekretario kaj S-ro A. W. Smith, Provizora Prezidanto.

Provizoraj Komitatoj estas:—S-roj W. A. Gething, J. S. Finch kaj E. J. Hollands kaj F-inoj A. Hueting kaj I. M. Lawton. K.E.L. jarkotizoj estas:—

Membro	2 ŝil.
Filiiginta Esperanto-grupo	} 5 „	
Koop. Gildo, kaj Junulara		
Klubo		
Filiiginta Eduka Komitato aŭ Societo	10½ „

KION FARU LA PRIVATULO ?

Antaŭ nelonge mi estis ĉe kunveno en Londono, aŭskultante bonegan paroladon de D-ro Edmond Privat, kaj poste unu el la ĉeestantoj faris al li la jenan demandon: "Kion povas fari la privata Esperantisto?" Antaŭ ol forlasi Britujon jen mia respondo al tiu demando.

Parolu. Pli ol io ni bezonas amikojn por nia movado, sed kiu povas esti amiko al tio pri kio li scias nenion? Nescio estas la plej grava kontraŭstaro kiu baras al ni la vojon al sukceso.

Vi, mia privatulo, posedas langon, sed senutila ĝi estas se vi ne uzas ĝin. Do, ekzercu ĝin por la propagando de Esperanto. Persona kontakto estas multe pli forta altrilo ol la reklamado; do, varbu ĉiun amikon, tiel ke li ankaŭ estu propagandilo por nia movado.

Skribu. La gazetoj kaj tagjurnaloj estas fortaj gvidantoj de la popoloj, kaj en iliaj kolonoj oni trovas multe da materialo pri kio oni povas skribi, montrante la neceson por internacia lingvo ĝenerale, kaj Esperanto speciale.

Se la gazetoj ricevos torenton da leteroj je ĉiu ebla okazo kaj el ĉiu parto de la lando, ili devos atenti ilin. Superŝutu ilin kaj

devigu ilian intereson. Ĉiu vera verd-stelano povas fari tion; eĉ sen ia persona sukceso, tio helpos pretigi la vojon por aliaj skribantoj. Kelkfoje, letero kontraŭ Esperanto incitas korespondadon en nia favoro, sed grave estas ke ĉiu partoprenu.

Al la kluboj mi diras, regule ensendu raportojn pri viaj kunvenoj. Eble la unuaj ne estos presitaj, sed iam oni bezonos materialon por pleniĝi iom da spaco—kaj jen la komenco. Sed neniam malesperu. Ne el la sukcesoj, sed el la malsukcesoj, venas la plej gloraj triumfoj.

Uzu. Se vi uzas Esperanton por la propra komerco vi havas videblan pruvon pri la utilo de la lingvo, kaj ankaŭ vi donas al la samideanoj en aliaj landoj materialon por ilia propagando.

Se vi loĝas malproksime de la klubo, jen okazo starigi novan klubon en via propra loko. Provu interesi la stabanojn ĉe la loka lernejo; varbu kaj instruu ilin.

Nelson Hill, Nov-Zelando

Noto.—Tiu temo estas tre grava, ĉar en tiom da lokoj ekzistas izolaj Esperantistoj kiuj volas fari ion por la movado, sed ne scias kion fari. Ni bonvenigos novajn kaj praktikajn ideojn. *Red.*

ISLAMA KORESPONDA RONDO

Oni organizas Islaman Korespondan Rondon (IKRO) kun la jenaj celoj:

1. Helpi ke Islamanoj ĉiulandaj kiuj scias Esperanton konu sin reciproke.
2. Disvastigi la scion de Esperanto ĉe Islamanoj en ĉiuj landoj.
3. Disvastigi informojn pri Islamo, kiel religio kaj socia sistemo, ĉe Esperantistoj.
4. Eldoni en Esperanto Islaman literaturon, kaj kiam eble, Islaman gazeton.
5. Organizati Esperanto-Islamanajn kunvenojn, ĉe Esperantaj kongresoj aŭ aparte, kaj kiam eble, Esperantistan grup-pilgrimadon al Mekko.

Nenia kotizo pagenda; sin turnu al la organizanto, prefere enmetante postmarkon britan aŭ internacian respond-kuponon: Colin Evans (Qassim Isma'il), 10 St. Philips Place, London, W.2, Anglujo.

EDZIĜO

Migliorini—Je 19 Septembro, 1945 en Roma, Prof. Elio Migliorini, delegito de IEL kaj direktoro de Orienta Universitata Instituto en Napoli, kun Elda Buffi en Roma.

MORTO

Antoñanzas—Je la 18a de Oktobro post longa malsano forpasis S-ino Clara Martines de Antoñanzas, edzino de S-ro Ireneo Antoñanzas, nia Del. en Mar del Plata, Argentino.

LA INTERLIGILO

46 rue Lamartine, Paris 9, Francujo

reaperos dum 1946, kiel centra organo de fakinformoj de la
INTERNACIA LIGO POR ESPERANTO EN POŝTOJ, TELEKOMUNIKOJ
kaj TRANSPORTOJ (I.L.E.P.T.T.)

Ĉiuj fakuloj de Poŝto, Filatelo, Telegrafo, Telefono, Radio, Fervojo, Ŝiparo,
Aviado,
sendu vian adreson, eĉ poŝtkarte, por ricevi tiun organon, plene redaktatan en
Esperanto de fakuloj el ĉiuj landoj.

Fondita en 1922, gvidata kiel antaŭmilita de Petro Filiâtre.

Komisio de la Centra Komitato de ILEPTT

Robert Filiâtre, *Ĝenerala Sekretario.*

POR DAŬRA EKSPOZICIO de Esperanto-Materialo

bonvolu sendi ĉiaspecajn kartojn, leterojn, presaĵojn, al

ESPERANTO-INSTITUTO kaj FILATELA CENTRO TUTMONDA REKLAMA AGENTEJO

S. A. Klukowski, direktoro,

5096 Plankinton Building, 161 W. Wisconsin Ave.,

Milwaukee 7, Wis., Usono

Telefonoj : Oficejo, BRoadway 6820 ; hejmo, SHeridan 4244

LA FORTO DE L'VERO

de Adi

Facila romano por
komencantoj.

Prezo : 3 ŝil., afr. 3p.



*Eldonita de
Dansk Esperanto-Forlag.*



Mendu ĉe I.E.L.

LA PASTRO EN VEJLBYE

St. St. Blicher

El la dana tradukis
A. H. Petersen.

Kriminalrakonto.

Prezo : 2 ŝil. 3 pencoj,
afranko 2p.

*Eldonita de
Eget Forlag, Odense.*

Mendu ĉe I.E.L.

FINNA BIBLIOTEKO ESPERANTA

N-ro 1. Batalo pri la domo Heikkilä. Romano.

Johannes Linnankoski. Trad. V. Setälä.

Prezo : 6 pencoj aŭ 2 respondkuponoj, afrankite.

N-ro 2. La Botistoj. Komedio en kvin aktoj.

Aleksis Kivi. Trad. H. Hall.

Prezo : 11 pencoj aŭ 4 respondkuponoj, afrankite.

N-ro 3. La Fianĉiĝo. Lea.

Du teatraĵoj trad. H. Hall.

Prezo : 8 pencoj aŭ 3 respondkuponoj, afrankite.

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

LIBROJ EL NORVEGUJO

Gaja Knabo. B. Bjørnson. Trad. L. Sandberg kaj D. Johansen.

Prezo : 1 ŝil. 9p., afranko 3p.

Victoria. Knut Hamsun. Trad. O. Rygg.

Prezo : 2ŝ. 3p., afranko 3p.

La Esperantista Strudrondo. A. Hasle.

Prezo : 6p., afranko 1p. (aŭ 2 respondkuponoj).

Norvega Ŝlosilo. 3p., afranko 1p.

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo